




Nozibele kaj la tri haroj

Nozibele and the three hairs

 Tessa Welch

 Wiehan de Jager

 dohlia

 3

 Esperanto eo / English en



Antaŭ longa tempo tri knabinoj eliris por kolekti
brullignon.

...

A long time ago, three girls went out to collect
wood.



Varmegis, do ili iris malsupren al la rivero por naĝi.
Ili ludis kaj ŝprucis kaj naĝis en la akvo.

...


It was a hot day so they went down to the river to swim. They played and splashed and swam in the water.



Subite ili ekkonsciis ke estas jam malfrue. Ili rapidis
hejmen al la vilaĝo.

...

Suddenly, they realised that it was late. They hurried
back to the village.



Kiam ili preskaŭ alvenis hejmen, Nozibele metis sian manon sur la kolon. Ŝia kolĉeno estis forgesita! “Mi petas, revenu kun mi!” ŝi petis siajn amikojn. Sed ŝiaj amikoj diris ke estis jam tro malfrue.

...

When they were nearly home, Nozibele put her hand to her neck. She had forgotten her necklace! “Please come back with me!” she begged her friends. But her friends said it was too late.



Do Nozibele reiris sola al la rivero. Ŝi trovis la kolĉenon kaj rapidis hejmen. Sed ŝi perdiĝis en la mallumo.

...


So Nozibele went back to the river alone. She found her necklace and hurried home. But she got lost in the dark.



Malproksime ŝi vidis lumon el kabano. Ŝi rapidis al
ĝi kaj frapis je la pordo.

...

In the distance she saw light coming from a hut.
She hurried towards it and knocked at the door.



Surprize al ŝi, hundo malfermis la pordon kaj diris, “Kion vi volas?” “Mi perdiĝas kaj bezonas lokon por dormi,” diris Nozibele. “Eniru, alie mi mordos vin!” diris la hundo. Do Nozibele eniris.

...

To her surprise, a dog opened the door and said, “What do you want?” “I’m lost and I need a place to sleep,” said Nozibele. “Come in, or I’ll bite you!” said the dog. So Nozibele went in.



Tiam la hundo diris, "Kuiru por mi!" "Sed mi neniam kuiris por hundo antaŭe," ŝi respondis. "Kuiru, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele kuiris iom da manĝaĵo por la hundo.

...


Then the dog said, "Cook for me!" "But I've never cooked for a dog before," she answered. "Cook, or I'll bite you!" said the dog. So Nozibele cooked some food for the dog.



Tiam la hundo diris, "Ordigu la liton por mi!"
Nozibele respondis, "Mi neniam ordigis liton por hundo." "Ordigu la liton, alie mi mordos vin!" diris la hundo. Do Nozibele ordigis la liton.

...


Then the dog said, "Make the bed for me!" Nozibele answered, "I've never made a bed for a dog." "Make the bed, or I'll bite you!" the dog said. So Nozibele made the bed.



Ĉiutage ŝi devis kuiru kaj balai kaj lavi por la hundo. Tiam, iun tagon, la hundo diris, “Nozibele, hodiaŭ mi devas viziti iujn amikojn. Balau la domon, kuiru la manĝaĵon kaj lavu miajn vestaĵojn antaŭ ol mi revenos.”

...


Every day she had to cook and sweep and wash for the dog. Then one day the dog said, “Nozibele, today I have to visit some friends. Sweep the house, cook the food and wash my things before I come back.”



Tuj kiam la hundo foriris, Nozibele prenis tri harojn de sia kapo. Ŝi metis unu haron sub la liton, unu malantaŭ la pordon kaj unu en la ĉirkaŭbarejon. Tiam ŝi kuris hejmen laŭeble plej rapide.

...


As soon as the dog had gone, Nozibele took three hairs from her head. She put one hair under the bed, one behind the door, and one in the kraal. Then she ran home as fast as she could.



Kiam la hundo revenis, li serĉis Nozibele. "Nozibele, kie vi estas?" li kriis. "Mi estas ĉi tie, sub la lito," diris la unua haro. "Mi estas ĉi tie, malantaŭ la pordo," diris la dua haro. "Mi estas ĉi tie, en la ĉirkaŭbarejo," diris la tria haro.

...

When the dog came back, he looked for Nozibele. "Nozibele, where are you?" he shouted. "I'm here, under the bed," said the first hair. "I'm here, behind the door," said the second hair. "I'm here, in the kraal," said the third hair.



Tiam ekkonsciis la hundo ke Nozibele trompis lin. Do li kuris kaj kuris la tutan vojon al la vilaĝo. Sed la fratoj de Nozibele atendis tie kun grandaj bastonoj. La hundo turnis sin kaj forkuris, kaj poste ĝi ne revidiĝis.

...

Then the dog knew that Nozibele had tricked him. So he ran and ran all the way to the village. But Nozibele's brothers were waiting there with big sticks. The dog turned and ran away and has never been seen since.



Global Storybooks

globalstorybooks.net

Nozibele kaj la tri haroj

Nozibele and the three hairs

 Tessa Welch

 Wiehan de Jager

 dohlia (eo)

